

TEA-BULTENO

5^A JARO

SEPTEMBRO - OKTOBRO 2002

NUMEROJ 9-10

*Brazil', por mi,
Brazil', por mi...*



El la brazila taglibro de Edvige kaj Elda

Jen la kutimaj vortoj: ho, kiel rapide pasas la tempo! Sed tio ja estas la vera vero! Kiam la 12^{an} de julio ni enaviadiliĝis en Triesto, feliĉo kaj ekscito trakturadis niajn vejnojn, niajn menson kaj koron, kaj dum la longedaŭra flugado, pripensante la planojn preparitajn surpapere, ni klopodis bildigi al ni la spertojn travivontajn sur brazila tereno. Tiam ŝajnis ke neniam alvenos la revenmomento, kvazaŭ ke, pro ia miraklo, ni povos tie resti ĝis kiam nostalgio pripatruja puŝos nin al hejmenigo.

Sed tio ja estis nura revo! La realo estas ke ĉiam ĉio, en ĉi vivo tera, havas sian finon. Sed restas la memoroj, kiuj neniam forvaporigos, ĉefe kiam travivaĵoj estis tiom intensaj, tiom agrablaj, tiom sensaciaj kiaj estis la niaj.

Alveno en Rio de Janeiro: Copacabana, Ipanema, Pão do Açúcar, Corcovado! Blankaj plaĝoj, Jesu-Krista statuĝo, historia centro, sambo, sunsubiroj, naĝado en oceano: kion plian deziri? Nur amikan kunestadon kun ĉarma esperantisto: ho, la kara Jorge das Neves. Jen, estas li, ho, mi rekonas lin inter mil aliaj! Ĉu vi memoras, kiam li venis al Triesto antaŭ ... ĉuu?!? Ne povas esti! Antaŭ 20 jaroj! Jes, tiel! Sed, ĉu li sukcesos rekoni nin? Jes, eĉ sen esperanta flago!

Kiaj mirindaj gastoj, li kaj la edzino Marilena! Ĉio kio antaŭe estis nur en nia imago, dank' al ili fariĝis realo, kaj ni malkovris Rio-n en ties plej belaj aspektoj, ni enamigis en ĝi kaj, senspire kaj - finfine! - silente, rigardadis ĝin de l' alto de Sukerpano, sub la ruĝ-oranĝaj sunradioj, kiuj reflektis sin en la blua oceano! Ho, tiu oceano, agresa kaj impeta, blua kaj verda, kies ondoj jetadis sin muĝade, tien kaj reen, tien kaj reen, balaante la grandiozajn plaĝojn. Nu, bone tiel ni konatiĝis kun Brazilo, sed eĉ tie ni portis iom da Triesto: fakte, dum vespero, okazis prelego pri Italio, nia regiono lige kun loka esperanto-movado, kaj fine projekciado de diapozitivaj pri nia urbo. La akcepto ĉe la Kultura Kooperativo de Esperantistoj estis varmega: trideko da homoj atente aŭskultis, demandis, informiĝis kaj entuziasme alparolis la du eksterlandaninojn. Konklude: vere, ie ajn Esperantuje, oni sentas sin kiel proprahejme!

Sed niaj planoj devigis nin tuj forflugi, kaj do, nun, ek al Foz de Iguaçu! Tute ne eblas priskribi la mirindajn Cataratas - unu el la plej grandiozaj mirindaĵoj de la tuta mondo. Ni esploris la partojn brazilan kaj argentinan kaj tion ĉi tute ne eblas priskribi surpapere, ĉar oni devas tion persone vidi, mergiĝi en tiu natura spektaklo, kiun nur Dia mano kapablis surscenigi. Ducent sepdek kvin akvofaloj okupas areon 3 kilometrojn larĝan, kaj la akvo

saltas en la riveron de 80-metra alteco. Viaj okuloj pleniĝas je tiu vidaĵoj kaj en viaj oreloj muzikas majeste kaj senhalte la tondrado de la ŝaŭmanta akvo. Dekoj kaj dekoj da ĉielarkoj aperas tie kaj tie en tiuj nuboj eligantaj el renkontiĝo de la falanta akvo kun la sube fluanta rivero. Ekestis unuiĝo korpa kaj spirita kun la tiea naturo, kaj tute ne estis tempo nek por paroli, nek por trinki, nek por manĝi: ĉiu el ni vivis tre intense tiujn momentojn, sentempajn, dezirante nur kunfandiĝi kun tiu sorĉa naturo kaj enigi en ĝin kiel eble plej profunde.

Kaj ankaŭ tie okazis renkontiĝo kun esperantistoj, kun Manoel Rocha Neto, episkopo de la Brazila Katolika Eklezio, kiu tre gasteme invitis nin al kunestado, ĝuste la unuan vesperon tie pasigitan.

Post tio komenciĝis vojaĝado tra la Ŝtato de Paraná kaj de São Paulo, kune kun parencoj de Edvige, kaj ekde tiam ni dronis en alia etosa dimensio, nome en tiu itala-brazila. Nu, se kutime oni diras, ke italoj estas, karaktere, sufiĉe viglaj, gajaj, kantemaj, bruemaj ks, provu imagi, kia povas esti la rezulto de "koktelo" el brazilano kaj italo: eksploda miksaĵo! Entute kvin tagoj fulme pasis inter unu vizito kaj alia, de unu urbo al alia, de unu domo al alia: festado, festenado, emociaj kaj gajegaj momentoj sinsekvis senhalte kaj senspire. Sed eĉ en tiuj momentoj de renkontiĝo kaj konatiĝo, esperanto ne estis flankemetita, tute ne! En Araĉatuba kuzo de Edvige aranĝis intervjuojn kun ĵurnalistoj de lokaj televido kaj ĵurnaloj: dum tiuj Edvige parolis pri Esperanto, pri la kialoj de nia veno al Brazilo, pri kongreso ks. Tut- kaj unua-paĝa artikolo aperis en la regiona ĵurnalo, dum vespere oni povis admiri ĉetelevide nian TEA-prezidanton kaj reprezentanton de Itala Federacio en la UK Brazila. Ho, kiaj travivaĵoj, ĉu ne?

Vojaĝado tra la Ŝtato São Paulo ĝis atingo de ties samnoma ĉefurbo donis ioman ideon pri la vasteco de la lando: oni veturis tra regiono trairita de griza rubando, la aŭtoŝoseo, kiun flankis senfinaj kampoj kun kultivaĵoj de kafo, maizo, sukerkano, furaĝo por nutri brutarojn, ktp. La koloroj frapis preskaŭ blindiĝe: la bluo de la ĉielo, la ruĝo de la tero, la verdo de la kampoj, ĉio pliintensigita de fajra suno. La urbo São Paulo vere ŝokis nin: neimageble granddimensia, tute moderna, kun altegaj nubskrapuloj, kun dek-miliona loĝantaro, kaosega trafiko, kaj superpoluciita! Centoj kaj centoj kaj centoj da aŭtomobiloj, en du, tri, kvar, kvin koridoroj alirantaj la urbocentron: mankis oksigeno por bone spiri, aŭ pli bone, ĉu ankoraŭ estas iom da oksigeno en tiu atmosfero? En la centro mem hom-amaso, rapide tien kaj tien iranta: "...ni perdiĝos, ni klopodu resti kune, alie..."

Post tiu dummatena promenado, fine, en la posttagmezo de la 27^a de julio, akompanitaj de aro da parencoj, vigle, sed iom melankolie kantantaj la faman kanzonon

Cielito lindo sub la rigardoj iom perpleksaj de la flughavenaj kontrolistoj, ni enaviadiliĝis direkte al Salvador da Bahia (ĉu eble pli hom-dimensia urbo?). Ne facilis superi tiujn emociajn momentojn de disiĝo de la italo-brazilaj parencaro de Edvige, ankaŭ ĉar en tiu momento mi konsciigis, ke ja, ankaŭ mi fakte apartenas al tiu familio: fine, temis pri instinkta, kora kaj senta adopto, reciproka.

Sed ni daŭrigu: en la flughaveno atendis nin bela junulo, kun kvar-aĝa infano, kiu aŭtomobile akompanis al nia hotelo, en la malnova urbocentro: *Pelourinho*. Ho jes, iom da kaoso, iom da bruo, memkompreneblas, ĉar ja ni estis en Salvador, kultura urbo kun afrika animo, kie festoj reprezentas la ĉiutagaĵon, kie ritmado de tamburoj kaj dancado naskiĝas spontanee en ĉiu angulo de la mallarĝaj stratoj de tiu historia centro. Ĉio ĉi karakterizas Salvador: sed sendorma nokto sufiĉis, por forkurigi nin de tiu karakteriza loko, por serĉi ion pli trankvilan en alia parto de la urbo. Nu, kion ni serĉis, en malmulte da tempo ni trovis kaj, post du-hora ripozado ĉe bela plaĝo, plifortikigitaj, fizike kaj spirite, ni daŭrigis nian pezan laboron: esti turistoj! Oni diras, ke Salvador havas entute 365 preĝejojn, nome po unu ĉiun tagon de la jaro. Eble ne tiel estas, tamen mi certigas vin, ke multajn ni vizitis kaj ke vere indis ties vizito. Kio plej frapis, estis la preĝejoj internaj, interesaj pro la stilo, plejparte baroka, pro la kaheloj blank-lazuraj, tipe portugaliaj, la famaj azuleĥoj, pro tiu parado de riĉabundo, oraĵoj kovrantaj ĉion, kolonojn, altarojn, statuojn, vandojn kaj plafonojn. Kaj, iom pripensiga, ĉar ĝuste ĉio ĉi estis konstruita kaj ornamita de la plej mizeraj homoj tiutempaj, nome la afrikaj sklavoj.

Ankaŭ tie daŭre esperantistoj "turmentadis" nin: kion fari? Kiel kaj kial malakcepti ĝentilan proponon pri ĉiĉeronado tra la urbo kaj en ties ĉirkaŭaĵoj? Tute ne eblis, ĉar - pri tio tutcerte ankaŭ vi konsentas - kiu pli bone ol lokano povas konatigi vin kun la plej vidindaj vidindaĵoj? Ni bonvenigis entuziasme kaj je malfermitaj brakoj tiun sinproponon de s-ro Josenilton: kaj dank' al li ni malkovris la belecon de kaŝita blua lago, *Lagoa do Abate*, inter blankaj sablaj dunoj, la religiemon inspiritan de la etoso en la preĝejo *Nossa Senhora do Bonfim*, kies kuracpovo estas mirakla, kaj la magion de la koloroj pentritaj de la sunradioj, sur ĉielo kaj sur maro, en placeto antaŭ la antikva lumturo de *Monte Serrat*.


Ĉu ni povos iam ajn forgesi la buntecon de Plaĝo de la Fortikaĵo (*Praia do Forte*)? En tiu regiono (aparte ĝoja okazo por mi!) eblis vizito al rezervejo de maraj testudoj (*Projeto Tamar*), kiujn oni lerte kaj sperte prizorgas, klopodante protekti ilin kontraŭ estingiĝo. Kaj ĉu eblas forgesi tiun plonĝadon en la travideblaj, ondantaj akvoj, ĉe la plaĝo de *Guarajuba*?

Ĝis revido, Salvador, kaj ek al Fortalezo, nia lasta celo! Jam estis la 31^a de julio kaj baldaŭ, je la 3^a de aŭgusto, komenciĝos la 87^a UK. Restas al ni nur du tagoj, destinitaj por iom esplori la ĉirkaŭaĵojn. Dum, intertempe, la organizantoj ŝvitegis en la lastaj preparlaboroj por akcepti la tutmondan esperantistaron, ni ekskursis al *Morro Branco*, tra labirintaj vojoj inter *falésias* (eroziaj klifoj) el dekdu-koloraj argiloj, al *Praia das Fontes*, kies dunojn ni supren-kaj malsupren-iris per *dune buggy* (malgranda aŭtomobilo taŭga por kuri sur sabla tereno), al *Lagoinha* mergita en fea medio, inter maro,

plaĝo, kokus-arboj, laguno kaj dunoj. Tie eblis eĉ duŝi sin, sur la strando, per dolĉa kaj varma akvo rekte elfluanta el la rokaro. Nekredeble! Kaj ...

... Nekredebla Kongreso!

Bonvenon al la Urbo de l'Suno!



66^a Universala Kongreso
(de Esperanto)
Fortalezo-Brazilo
03-10 aŭgusto 2002

Alvenis la tago, kiun tuta generacio de brazilaj geesperantistoj atendis! Depost 1981, kiam en Braziljo okazis la 66^a Universala Kongreso, oni atendis la oportunion kunveni kaj kunvenigi esperantistojn en Universala Kongreso de Esperanto en Brazilo. Se vi alvenis al Fortalezo antaŭ

kelkaj tagoj, vi certe jam konatiĝis kun la famkonata afableco de cearaanoj. Tutcerte vi jam spertis la varmecon de brazila vintro sed ankaŭ la samtempe freŝajn marajn ventojn. Se vi ĵus alvenis, prepariĝu por gastronomiaj travivaĵoj!

Bonvenon kaj ĝuu Fortalezon!

Per tiuj ĉi vortoj salutis nin LA BELA SONGO DE L'OMARO, la Kongresa Kuriero redaktita de vigla, ideoriĉa brazila teamo sub la sperta gvidado de James Rezende Piton. Ĉi kuriero, kies titolo ja diras ion pri la fantaziemo de niaj brazilaj geamikoj, informis la kongresanojn dum tuta semajno pri la diversaj okazint-kaj-ont-aĵoj.

Memorinda la malferma ceremonio, ĉeeste de gravuloj, inter kiuj la guberniestro de ŝtato *Ceará*, Beni Veras, kaj la reprezentanto de la Brazila prezidento, Ministro gen. Alberto Cardoso, kiu i.a. legis siajn salutvortojn en tre bona Esperanto-parolo. Sendito de UNESKO, s-ro Patrick Gallaud, legis la mesaĝon de la Asista Direktoro de UNESKO por Edukado, John Daniel. Intere estas, ke s-ro Gallaud ĉeestis nian kongreson dum la tuta semajno, aktive kontribuante en la diskutoj rilataj al UNESKO: kiel ombro sekvis lin Vincent Charlot, kiu senĉese interpretadis esperante-francen kaj inverse, eĉ dum la distraĵ vesperoj. En la teatra salono sidis la konsuloj de Aŭstrio, Francio, Germanio, Hispanio, Italio, Norvegio kaj Svedio, Rumanio, Usono kaj la Ĉina ambasadoro. Fine, kvindek ses diversnacianoj salutis nome de sia lando, antaŭ la tradicia kantado de la himno "La Espero" fare de ĉirkaŭ 1300-persona entuziasma publiko.

La programo, kiel kutime, estis riĉa, diverstema, interesa; la oratoroj ĉiam tre kompetente prezentis sian argumentaron. Inter tiuj, kiujn mi ĉeestis, rimarkindas la prelego de prof. Cesar Oliveira de Barros Leal, prokuroro de ŝtato *Ceará* kaj scienca konsilanto de Latinamerika Instituto de UNO por krimprevento kaj traktado de krimuloj. La titolo estis: *La elĉerpiĝo de enprizonigo kaj la efika respondo de alternativaj punoj*. Tiun temon li pritraktis en ENPRIZONIGO - KREPUSKO DE ERAO, libro de li malavare donacita al ĉiu kongresano, en la traduko de James Rezende Piton. Per tiu prelego li prezentis al la aŭskultantaro, ankaŭ per diapozitivaj kaj filmoj, la koŝmaran situacion de malliberuloj en latinamerikaj prizonoj, ĉefe en tiuj brazilaj. Oni konatiĝis kun realo tre kruda, kiun tutcerte neniu el ni iam ajn estis spertinta: vere ŝokiga tiu informo, pri kiel homoj, jam senigitaj je libereco, perdas propran individuecon, ĉian dignon, ĉian intimecon kaj suferas je perfortoj, submetiĝas je la leĝo de la plej fortaj, cele al nura pluvivo. La vivkondiĉoj estas je la limo de la tolereblo, en terora etoso, inter ĉiaspecaj

krimuloj gardataj de provosoj eĉ pli krimaj. Celo de la aŭtoro estas aplikado de alternativaj punoj, pli humanaj, precipe por homoj kiuj estis punitaj pro krimoj je malgranda ofenda potencialo kaj eviti la amasigon en tre malgrandaj ĉeloj de ĉiaspecaj kondamnitaj, sen ia ajn distingo de la graveco de la delikto.

Alia tre interesa programero estis la kunveno pri Indiĝenaj Dialogoj, kies programo estas aŭspiciata de UEA. Tiam la direktorino de ID kaj Atilio Orellana Rojas prezentis la Fondajon, kiu uzas Esperanton kiel ponto inter kulturoj. Indiĝenaj Dialogoj celas mondscale subteni la liberan komunikadon inter la organizoj de indiĝenaj popoloj, reprezentantoj de la plej granda parto de la kultura kaj lingva diverseco en nia planedo. Per esperanto, per modernaj komunikiloj kaj per transkultura trejnado, oni jam sukcesis komunikigi reprezentantojn el tre diversaj popoloj, kio povas krei perspektivojn por komuna konstrucela agado. En la mondo nuntempe estas ĉ. 5 mil indiĝenaj popoloj, kiuj parolas 4.500 diversajn lingvojn; ĉiumonate malaperas unu-du lingvoj, kio signifas malaperon de kulturo kaj medio, dum la popoloj mem suferas ĉiutage pro daŭra malrespekto de la homaj rajtoj. Tial la indiĝenoj mem serĉas por si komunan lingvon, ĝuste por sukcesi komunikadi, plene kaj rekte, por alfronti la mondskalajn problemojn: tio estas klimata ŝanĝiĝo, malsato, manko de akvo, malsanoj, tutmondiĝo, abisma diferenco inter riĉaj kaj malriĉaj popoloj, ktp.

Rete aperas la senpaga bulteno TAMTAMO, en kiu eblas trovi informojn pri ĉi tiu tre grava agado kaj ties evoluo (vd. ankaŭ <http://www.idnetweek.nl>).

Kelkaj eroj el La Bela Sonĝo de l'Omaro

⇒ Dum flugo al Fortalezo, kolonelo Fernando Marinho el Rio de Janeiro klarigis al stevardino, ke inter la pasaĝeroj estas pluraj eksterlandanoj survoje al la 87^a UK. “Ĉu eblas, ke la komandanto permesu, ke oni laŭparolile prezentu salutvortojn en Esperanto?” Post permeso de la aviadilestro, s-ano Marinho komisiis la “soldaton” Jorge das Neves plenumi la mision. Per koncizaj vortoj la konata brazila poeto pruvis la taŭgecon de la lingvo. Poste, en la portugala, li dankis al la aviadilistoj pro la afableco. Reprezentanto de RADIO RIO DE JANEIRO sukcesis surbendigi la aeran paroladon de Jorge, same kiel la aplaŭdojn. **Brazila miraklo!!!**

⇒ Novaj Honoraj Membroj de UEA. Estis distingitaj per tiu titolo la jenaj geesperantistoj, kiuj faris gravajn servojn al la tutmonda Esperanto-movado: Evaldo Pauli (Brazilo), Kathleen Hall (Britio), Kyotaro Deguĉi (Japanio) kaj Hans Bekker (Nederlando).

⇒ 23 medicinistoj el 10 diversaj landoj ĉeestis la kunvenon de UMEA, dum kiu ties prezidanto d-ro Imre Ferenczy (Hu) raportis pri la laboro farita pasintjare kaj pri planoj estontaj. Estis anoncigitaj la okazigo de la 14^a Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco en la urbo Oradea (Rumanio) julie 2003 kaj la baldaŭa eldono de esperanta-angla terminaro pri medicino, verkita de d-ro S. Yamazoe, nunjare.

⇒ Nacia Vespero fariĝis grandioza evento. Dum ĝi oni prezentis la popolan kulturon de Brazilo, starigante la esencon de ĝia kulturhistorio, granda mikso el multaj gentoj. Unue prezentiĝis senĉesa serio de popolaj dancoj kaj kantoj, kiuj montris mirindaĵojn el multaj partoj de Brazilo, laŭ la sono de diversaj afrik-brazilaj muzikiloj.

Kaj apoteoza la reprezentado de la tradicia festo, portugaldevena, nuna karnavala manifestiĝo, kiu ekzaltis la publikon, tiom intense ke ĝi ne sukcesis reteni sin je preskaŭ frenezaj eksterigoj de entuziasmo pro la danca, muzika, kostuma spektaklo. “Brazilo fariĝis la mondo, kaj la mondo fariĝis Brazilo”.

⇒ Rondo Kato. Trideko da kat-amantoj kunvenis sub gvidado de Franĉjo Veuthey kaj interŝanĝis konsilojn kaj opiniojn pri kat-problemoj. La redaktado de la asocia bulteno FOLJOJ DE KAT-AMIKARO, normale aperinta 3-foje jare, bedaŭrinde tute lamis en 2002: oni esprimis la deziron, ke tiu malreguleco ĉesu kaj ke fine la membroj ricevu tiun valoran interligilon.



⇒ Universala Artista Ligo de Esperantistoj organizis dumkongresan artekspozicion. En ĝi partoprenis sep artistoj, ĉiuj el Brazilo, tre laŭdataj de la vizitantoj.

⇒ Refondo de la Budhana Ligo Esperantista. Kunvenis interesatoj kaj budhanoj por la refondo de tiu Ligo. Elektigis estraro kaj la Japana Budhana Ligo Esperantista sendis sian saluton, petante ties filiigon.

⇒ Manlaboro. Okazis fakkunsido MANLABORO, kun partopreno de ĉirkaŭ 30 esperantistoj. Oni diskutis pri brodado kaj ĝardenkulturo. En Fortalezo la brodado estas tre prospera kaj infanoj heredas ĝin de patrino kaj avino. Eĉ viroj brodas!

Multo ankoraŭ direndus, sed mankas spaco. Do, konklude, kio plie pri la kongreso? Gaja, aktiva, agema, kantema, dancema, kaj tre, tre pacienca surloka laborantaro kontribuegis por igi ĝin neforgesebla. Ĉu estis mankoj, ĉu estis fuŝoj, ĉu estis stumbloj? Ho jes, tucerte, antaŭ- kaj malantaŭ-kulise, sed ĉio tre facile forgesebli: fronte al rideto amikiĝema kaj post sprita kaj samtempe kvieta respondo, kiel kontraŭbatali, kiel kontraŭstari? Ja, rido kaj gajeco estas pli infektaj ol virusoj!

Elda Doerfler

Kongresa Rezolucio

La 87^a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Fortalezo (Brazilo) de la 3^a ĝis la 10^a de aŭgusto 2002 kun 1484 partoprenantoj el 58 landoj, kun la temo “Diverseco - ŝanco ne minaco”,

Konstatas, ke la daŭranta integriĝo tutmonda kondukis al pozitivaj rezultoj, ekzemple internaciaj instrumentoj pri homaj rajtoj, sed ankaŭ al malegalecoj kaj al la ĉiam pli rapida perdiĝo de malgrandaj lingvoj kaj kulturoj,

Gratulas UNESKON pro ties agado sur la kampo de lingva kaj kultura diverseco, ekzemple per la Tago de la Patrino Lingvo je la 21^a de februaro ĉiujare, kaj aparte bonvenigas, ke la Ĝenerala Konferenco alprenis je la 2^a de novembro 2001 Universalan Deklaracion pri Kultura Diverseco,

Konstatas, ke la principoj kaj celoj de UNESKO en tiu kampo kongruas kun la idealoj de la movado por Esperanto, kiu celas per neŭtrala komunikilo transponti la kulturojn, tiel kreante forumon por egaleca interŝanĝo de kulturaj valoroj,

Atentigas en tiu kunteksto pri la graveco de la lingva dimensio de kultura diverseco, kaj substrekas la pretecon de la Esperanto-movado kunlabori kun ĉiuj organizaĵoj, kiuj okupiĝas pri la kultura dimensio en internaciaj aferoj.

Pinokjo, la Longnazulo

De Pier Giorgio Soranzo

Kiel ĉiuj knaboj de la tuta mondo, siatempe ankaŭ mi legis la romanon de Carlo Collodi PINOKJO. Tiutempe, la legado estis ducela: la unua celo konsistis en la devo legi la romanon kiel hejman taskon ordonitan de la instruisto de la elementa lernejo; la dua, rapide atingi la finon de la libro por scii kiel finiĝos la aventuro.

Antaŭ kelkaj tagoj, dank' al la represado farita de la tagjurnalo IL CORRIERE DELLA SERA, mi povis relegi la romanon. Ĉifoje la celo estis alia: refreŝigi la memoron, ĉar multo el la romano estis forgesita. Sed...

La unua miro trafis min kiam mi eksciis, ke la libro estas la itala ĉefverko plej tradukita (ĉu povas manki tiu en esperanto?) kaj vendata en la mondo.

La dua miro estas la jena: La libro ne estas leĝera romano; sed ĝi estas profunda pedagogia ĉefverko. En preskaŭ ĉiu ĉapitro troviĝas edukigaj konsiloj, fabele maskitaj, sed trafite instruaj. La parolanta grilo, Ĝepeto, la bluharara feino, la granda krabo, la malalta kaj dika Kaleŝisto kiu veturigas Pinokjon kaj Meĉon al Ludolando, kaj aliaj rolantoj donas instruojn, rekte aŭ malrekte, pri la maniero kreski honeste kaj prepari sian estonton. Komprenoble, la konsiloj ne estas akceptataj fare de Pinokjo, tial li devas alfronti riskajn kaj danĝerajn aventurojn.

Pinokjo estas kaprica, malobeema, fripona, ventkapa kaj senprudenta pupo, ĉar li volis "ŝovi sian nazon en fremdan vazon" (ĉu pro tio lia nazo estis longa?). Unuvorte, li estas "ligna kapulo", sed li havas oran koron. Kaj dank' al tiu bonega flanko de sia karaktero li, finfine, savos sin kaj fariĝos vera homo.

Sed mi volas meti la akcenton, substreki, evidentigi frazon kiu, laŭ mi, estas la bazo ankaŭ de la moderna socio. Kiam Pinokjo iras al la komunuma lernejo (26^a ĉapitro), liaj samklasanoj primokas lin. Je certa momento li perdas la paciencon kaj diras:

"Mi respektas la aliajn kaj mi volas esti respektata".

Surpriziga, pensiga kaj meditiga frazo!

Nu, la vivo fariĝos civile altvalora se ekzistas reciprokeco. Mi volus aldoni, ke la principo de la reciprokeco devas fariĝi la bazo de nia hodiaŭa vivo, civila, politika kaj religia, ĉefe en la konsidero de la ĉiukampe delikata situacio, kiun ni travivas.

Collodi jam antaŭ preskaŭ du jarcentoj rimarkigis: "Mi respektos la aliulojn en la sama maniero, en la sama kvanto kaj en la sama proporcio laŭ kiu mi estas respektata".

Meditu, homoj, meditu!

OSIEK-Premio juĝita al Barkoviĉ!

Dum IEK 2002 (Internacia Esperanto-Konferenco) en Loveno (Belgio), laŭ balotoj de sesdeko de ĉeestantaj OSIEK-anoj la ĉi-jara premio estis aljuĝita al Kreŝimir Barkoviĉ pro la traduko de la ampleksa libro **7000 TAGOJ EN SIBERIO** (de Karlo Stajner).

En la 496-paĝa libro, kiu estis eldonita de SAT en 1983, Karlo Stajner, sincera komunista fidela al sia idealo, kaj konsciante pri tio, ke la realigita sistemo en Sovetio ne estis socialismo, priskribis sian preskaŭ 20-jaran restadon en Siberia gulago.

La Premio OSIEK estas aljuĝita en ĉiu jaro al vivanta esperantisto pro kultura kreaĵo nefikcia en Esperanto, publikita per ia ajn perilo (libro, kasedo, bendo, mikrofilmo, kompaktdisko...), kies amplekso egalvaloras al 100-paĝa libro. Kaze de traduko, la premio rekompencas la esperantigon, sendepende de la naturo de la originalo. La nuna valoro de la premio estas 400 eŭroj. (vd: <http://www.osiek.org/premio/>)

Nova Plena Ilustrita Vortaro jam ĉe UEA-Libroservo

La nova eldono, kiun ĉefredaktis Michel Duc-Goninaz, estas funde reviziita kaj aktualigita, kun ilustraĵoj lokigitaj ne plu en la lastaj paĝoj, sed enkorpigita en la teksto mem. Formato: 150x255 mm, 1265 paĝoj. Eldonis SAT. La Libroservo de UEA vendas ĝin kontraŭ eŭroj 78,00 plus la kutimaj aldonajoj: 10% por sendokostoj; 6% por imposto (nur por EU-landoj). Per mendoj de 3 ekz. samtempe (al la sama adreso) la LibroServo donas sesonan rabaton (16,66%).



Dimanĉon la 8^{an} de septembro

Festo de Amikeco

ĉe Dreiländerecke

Geamikoj el la tri najbaraj landoj atendas vin sur montopinto de *Monte Forno*, por gaja kunestado kaj reala atestado, ke homoj pace deziras kunvivi, ignorante ĉian ajn diferencon pri raso, etnio, religio, politika kredo, lingvo, kulturo ks.

Triesta esperantistaro, kiel kutime, se vetero estos favora, partoprenos en tiu bela renkontiĝo. Kiuj intencas aliĝi, sin anoncu ĉe TEA-sekretario, telefone: 040 763128 (marde kaj vendrede - 19.30-22.00) aŭ rete - testudo@adriacom.it

Ne forgesu vian Alp-Adrian T-ĉemizon kaj - ĉefe - komfortajn ŝuojn!

Septembra Programo en TEA

| | |
|------------------|---|
| Mar 03-09 | Prepar-laboroj por ekspozicio |
| Ven 06-09 | Gasto inter ni: Marija Beloŝeviĉ |
| Dim 08-09 | Festo de Amikeco—Arnoldstein |
| Mar 10-09 | Kartludado – Rumio kaj Trisepe |
| Ven 13-09 | Brazilo, por ni!!! Diapozitivoj |
| Mar 17-09 | Prepar-laboroj por ekspozicio |
| Ven 20-09 | Eŭropa Kongreso: inaŭgura prelego de prof. H. Tonkin |
| Mar 24-09 | Prepar-laboroj por ekspozicio |
| Ven 27-09 | Prepar-laboroj por ekspozicio |
| 27-28-29/09 | Bologna - Festo por la 90-jariĝo de la Esperanto-Grupo ACHILLE TELLINI 1912 |

Informoj ĉerpitaj el: LA BELA SONĜO DE L'OMARO, RET-INFO kaj NOVA SENTO

BULTENO de la membroj de
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Sidejo: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
tel/fakso: +39 040 763128
Reto: esperantotrieste@adriacom.it; nored@esteinet.it
Poŝta adreso: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro-Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349